

Alvoko por internacia renkontiĝo cele al la starigo de Bloko por la Integra Revolucio

Tio estas alvoko al ĉieaj kolektivoj, personoj kaj popoloj kiuj estas laborantaj de malsupre por konstrui alian socion kun la celo elstarigi internacian renkontiĝon kaj fondi la Blokon por la Integra Revolucio.

Kuntekstigo

Hodiaŭ multaj personoj konsentas en la denunco de la elstarigita formo de socia organizo en la plimulto de la landoj de nia planedo kiu kondukas nin al krizoj en ĉiuj kampoj de nia vivo: ĝi malhelpas preni sociajn kaj vivesencajn decidojn, ĝi reduktas nin al ŝanĝmoneroj kiel laborforto, ĝi individuigas nin, ĝi separas nin kaj nuligas vivformojn kaj vivrimedojn de la Tero.

Ni pensas ke tiu detruo, tiu interna vakuo, tiu separo de tiuj kvalitoj kiujn ni povus disvolvi ne estas nura konsekvenco de malbonaj registoj, de senskrupulaj kapitalistoj sed estas io eca al la dinamikoj de tiu sistemo, tra la institucioj kaj la superregaj valoroj kiuj karakterigas ĝin.

Superrego estas submeto ekzercata per la povo kaj ĝi evidentiĝas totale kaj videble tra la monopolo de la fizika perforto (genocidoj, murdoj, torturoj, subpremo..., exercata de la subpremaj fortoj) kaj pli akcepte tra aliaj formoj de struktura perforto kaj socia kontrolo: la salajra laboro, la privata propio, la amaskomunikiloj, la reklamo, la asistado...

En ĉiuj kampoj, ni povas konstati que la superrego kaj la povokoncentriĝo pli kaj pli altiĝas en la plimulto de la landoj.

Rezistaj fokuso

La superrego provas subfosi la homan dignecon, kiu estas en si mem semo de rezistemo kaj de la konstruo de aliaj mondoj. Indigenaj komunumoj kaj popoloj, sociaj kaj politikaj movadoj memadministrataj kaj rezistemaj kolektivoj en ĉiuj planedanguloj sekvas sian longan batalon por defendi la teron kontraŭ la ekspluatado, la malstrukturiĝo de ĝiaj kulturoj kaj la humiligo de ĝiaj homoj. Tiel en la kampo kiel en la urbo, la digneco donas al ni rajtigajn formojn de memdefendo de la popoloj, de la homaj valoroj kaj de la homaro mem.

La mobilizadoj multobliĝas tie kie rezistas la digneco, la malsubmeto kaj la malobeemo. Kaj ili plifortigas la nekunlaboron kun la superregaj strukturoj (ŝtatoj, institucioj kaj entreprenoj).

Ili estas rezistaj fokuso kontraŭ la alsimiligo kiuj defias la povon. Ili estas ara klereco moviĝanta, kreado kaj garantio ke aliaj mondoj necesas kaj ekrealiĝas.

Cele al la Integra Revolucio

Tiuj rezistaj fokuso ankaŭ estas esperaj fokuso ĉar ili elmontras volon ne akcepti la nunan barbarecon. Spite al tio, ni devas regreti ke multaj transformaj klopodoj ankoraŭ nur centriĝas en la rezistemo kaj bazas sin en la peto de reformoj. Ni pensas ke por rezisti kaj antaŭ ĉio, por transpasi la nunan sistemon, ni devas memkonstrui nin kiel personojn kaj komunumojn kaj konstrui novan socion.

De kelkaj jardekoj, kaj pro la plirapidiĝo de la lastaj jaroj nutrita de la sistemeca krizo kiu regas la nunan panoramon, diversaj procezoj de socia kaj memadministrata konstruo naskiĝis kaj fortiĝis kiel lumturoj de realeco kiuj lumigas la esperojn de Integra transformiĝo de la socio.

Kelkaj el tiuj iniciatoj estas kunordigitaj inter si sed, ĝenerale, ni trovas grandan malkonektiĝon inter ili kaj mankon de komuna laboro inter diversaj afinaj movadoj. Samtempe, ni pensas ke ni multfoje preterlasas la gravecon de la laboroj de persona kaj kolektiva pliboniĝo por atingi la deziratajn ŝanĝojn. Ni pensas ke ni devas labori por provizi nin per komuna kadro kiu permesas al ni kune remi al komuna direkto, memstare kaj malcentriĝe kaj kiu permesas al ni konstrui, konstrui nin kaj samtempe rezisti.

Nemalhavebla ŝtupo por antaŭiri direkte al tiu kunfluo, al tiu komuna kadro, estas kreado de renkontaj spacoj kie ni povas diskuti, pripensi kaj labori pri la konkretaj manieroj disvolvi tiun revolucion.

Kiel freŝdate eldiris la zapatistoj, jen la momento de la jeso, jen la momento trovi nin, ni ĉiuj kiuj:

« ...respondis “jes” al la demando “Povus esti alimaniere?” Mankas respondi al la demandoj kiuj ariĝas post tiu jes: kiel estas tiu alia maniero, tiu alia mondo, tiu alia socio kiun ni imagas, volas kaj bezonas? Kion ni devas fari? Kun kiuj?»

Ili ankaŭ diras ke se ni havas respondojn al tiuj demandoj, jen la momento disigi ilin, kiel se ni estus atendintaj tiun momenton. Estas nun kiam ni, la geinstigantoj de tiu alvoko, estas preparataj por komenci helpi al la disigo de la respondoj.

Tiel do, kaj pro ĉiuj tiuj kialoj, ni alvenigas al vi tiun alvokon por paroli pri tio, trovi nin kaj konstrui internacian spacon de kunfluo kiun ni nomis Bloko por la Integra Revolucio.

Kiun sencon ni donas al Integra Revolucio?

Revolucio: *radika transformiĝo de la strukturoj kaj valoroj kiuj fondas socion.*

Integra: *kiu enhavas ĉiujn eblajn elementojn por esti kompleta.*

Integra Revolucio: *procezo de historia signifo cele al la konstruo de nova memadministra socio bazita je memstarigo kaj nuligo de la nunaj superregaj formoj: la Ŝtato kaj la kapitalismo kaj ĉiuj aliaj kiuj tuŝas la homajn rilatojn kaj la rilato kun la naturo.*

Ĝi signifas konscian, personan kaj kolektivan agadon cele al pliboniĝo kaj reakiro de la kvalitoj kaj valoroj kiuj kapabligas nin por komuna vivo. Ĝi ankaŭ signifas la konstruon de novaj organizaj formoj kaj strukturoj en ĉiuj vivkampoj kiuj garantias egalecon en la decido kaj justecon en la satisfo de la vivesencaj bezonoj.

Kial tiu komuna spaco?

- Plialtigi la **konscion** pri la problemaroj de la nuna sistemo, la krizo de valoroj kaj de la homaj kvalitoj kaj la ebla solviĝo.
- Konstrui **kolektivan identitecon**, multoblajn kontraŭpovojn kiuj povus diskonigi, kuraĝigi kaj antaŭigi klare kaj grave la alisistemecajn proponojn ĉirkaŭ la Integra Revolucio.
- Diskonigi kaj **videbligi** la ekziston de specifaj procezoj de socia konstruo kiuj disigas la ideologian spacon de la Integra Revolucio, por tiel inspiri la kreadon de novaj similaj procezoj.
- Labori en **komuna kadro** de malakcepto de la superrego kaj de konstruo de novaj socioj: krei sinergiojn, debati, disigi taktikojn, rimedojn kaj agadplanojn inter la personoj kiuj agnoskas tiun komunan kadron.

Funkciado de la komuna spaco

Ni proponas la Blokon kiel ideologian kadron ne kiel organizon, akorde kun la proponitaj celoj kaj por faciligi ĝian funkciadon. La kolektivoj kiuj membriĝas al la Bloko kaj la projektoj tie aperantaj estos tute memstaraj. La aspektojn de la funkciado de la Bloko (membroj, komunikiloj, renkontoj, decidpreno...) ni proponas skizi dum la procezo antaŭ la renkontiĝo.

Kiuj estas la celoj de la renkontiĝo?

- Interkoni nin kaj disigi spertojn kaj strategiojn.
- Ratifiki la bazojn de la Bloko aŭ la fondiĝan manifeston.
- Konstitui la Blokon, konsenti pri ĝia funkciado kaj malfondi la promocian grupon.

Kiam organizi ĝin?

La renkontiĝo ne havas fiksitan daton. Ni proponas realigi ĝin kiam granda kaj varia aro da kolektivoj de diversaj teritorioj interesiĝas partopreni al ĝi. La kunvokado okazos minimume 3 monatoj antaŭe.

Kaj antaŭ la renkontiĝo?

De nun ĝis la realigo de la renkontiĝo, ni proponas realigi kolektivitan procezon de defino kaj preparado de ĝi kaj de ĝiaj ĉefaj enhavoj kiel ekzemple la fondiĝa manifesto de la Bloko kaj ĝiaj organizaj aspektoj.

Samtempe ni kuraĝigas vin diskonigi tiun alvokon sur viaj teritorioj kaj ekkrei tiun komunan spacon je regiona nivelo.

Kiel vi povas partopreni al la procezo?

Se vi volas kunlabori al la fondiĝo de tiu Bloko por la Integra Revolucio, ni proponas al vi du vojojn tiucele:

- Se vi interesiĝas pri partopreno en la promociata grupo aŭ pri kunlaborado en iu ajn tasko, bonvolu plenumi tiun [formularon por individuaj personoj](#)¹.
- Se vi estas kolektivo kaj se vi interesiĝas pri partopreno al la procezo kaj/aŭ al la renkontiĝo, bonvolu plenumi tiun [formularon por kolektivoj](#)².

Kiel povus esti la renkonto?

Ni proponas kvartagan renkonton kun la jena programo:

- Unu tago de prezentado kaj interkono.
- Du labortagoj kun grupoj por interŝanĝi spertojn kaj strategiojn kaj por alporti proponojn al la manifesto kaj al la organizaj aspektoj.

1 <http://integrarevolucio.net/eo/formularo-por-individuaj-personoj>

2 <http://integrarevolucio.net/eo/formularo-por-kolektivoj>

- Unu tago por la konkludoj kaj oficiala fermo.

Kie oni povas organizi ĝin?

Ni proponas organizi la renkonton en Katalunio, en iu loko facile atingebla kaj kun facilaj loĝeblecoj por la gepartoprenantoj.

Promocia grupo

Ni estas okpersona grupo kiu, ekde la kataluna teritorio (sudokcidente de Eŭropo) fiksas al ni celon instigi la **Blokon por la Integra Revolucio**. Ni partoprenas en projektoj ligitaj al ideologio de Integra Revolucio, inter kiuj elstaras la movado por la integralaj kooperativoj kaj ni pensas ke necesas ideologia spaco por videbligi, interkonekti kaj plifortigi la praktikojn kiuj realiĝas tiucele en la tuta mondo.

Ideologiaj bazoj de la alvoko

La baza principo estas la lukto kontraŭ ĉiuj formoj de superrego kaj la konstruo de aliaj novaj socioj tra Integra revolucio.

Ni konkretigas tion kun la ĉisubaj punktoj, forme de ideologiaj bazoj kiujn ni skize klarigas kaj kiujn ni devus prilabori kaj elstarigi cele a la redaktado de la fondiĝa manifesto de la Bloko:

1) Plijustaj homaj rilatoj bazataj sur la libereco

- Ni rifuzas iu ajn superregan aŭ diskriminacian formon inter la homoj pro iu ajn kialo, t.e. seksa, genra, seksa orientiĝo, etnia aŭ kultura, aĝa, heredeca aŭ klasa...
- Ni fidas en la mutuala subteno kaj en la solidareco, la konfido, la respekto, la frateco kaj ĝenerale en la amo inter la homoj.
- Ni volas kontraŭi la nunan malnobligon de la homo kiu okazas en la plimulto de la mondolokoj kaj kiu estas konscie kuraĝigata de la superregaj elitoj. Ĉar ju pli enpovigitaj estas la personoj despli malsekura troviĝos la sistemo.
- Ni bezonas volon pliboniĝi, bazata sur la aktiva aŭskulto kaj la konstanta pripenso, kaj sur la kutimo je la kritikoj kaj memkritikoj cele al tiu pliboniĝo
- Ni volas disvastigi la bonajn praktikojn en la interpersonaj rilatoj en la tutan homaron.

2) Memorganizo kaj popolaj decidpovaj asembleoj

- La asembleo, kiel maniero decidi kun egaleco je voĉo kaj voto estas la plej rajtiga formo organizi iu ajn komunumon, popolon aŭ kolektivon, ĉar estas necesa kondiĉo por la libereco.
- Popolaj decidpovaj asembleoj: memdetermino de la popoloj pere de tiu horizontala organiza formo kaj libera aliĝo de la personoj kaj popoloj al la komunumoj kaj al la konfederacioj.
- Rilatoj inter popoloj kaj komunumoj bazataj sur la solidareco, la libereco kaj la malcentriĝo: horizontala kaj egaleca interdependeco, dispono rilatiĝi kaj kunordiĝi, de la plej lokalaj kaj regionaj niveloj al la plej grandaj, decidante je eta skalo ĉio kio eblas kaj je pligranda skalo ĉio kio necesas (principo de subsidiarieco, konfederació, ...)

- Konstruo en la diverseco, kun respektoj de la homaj kaj personaj diferencoj, inkluzive la minoritatoj en ĉiuj assembleaj decidoj.
- Tial malakcepto de la Ŝtato en ĉiuj ĝiaj versioj.

3) Tio komuna, tio publika

a/ Rekuperi la propraĵon kiel komunan havaĵon kun popola posedo kaj kontrolo

- Ni devas rekuperi la kontrolon de la tero kaj de la produktiloj kiel komuna havaĵo, sekurigante ĝian uzon tra la komunuma propraĵo (de la komunumo) kaj, tiel kiel publikaj havaĵoj.
- Ni rifuzas la privatan propraĵecon kiel ilo de la potencaj klasoj por amasigi kapitalon kaj estarigi la kontrolon sur la uzo kaj la propraĵo de la tero kaj de la produktiloj, kiu ĉiamigas la superregan sistemon pere de la salajra laboro, la amasigo, la ekspluatado kaj la spekulado.
- La privata intereso malproksimigas nin, individuigas nin kaj detruas la komunuman propraĵecon kaj la komunajn havaĵojn.

b/ Konstrui publikan, kooperan kaj memadministran sistemon baze de mutua subteno

- Ni laboras por la komuna bono, por sekurigi ke ĉiuj niaj vivesencaj bezonoj (la nutrado, la sano, la loĝado, la edukado, la energio, la transporto...) estu certigitaj tra vere publika sistemo, memkonstruita surbaze de memadministrado, kooperante unuj kun la aliaj, kuraĝigante la valorojn kaj la esence homajn kapablojn.
- Ni rifuzas la Ŝtaton kiel kontrolan sistemon bazata sur la ekspluatado de la homo fare de la homo kaj la ŝtatajn helpojn kiel individuigan asistadisman. Ni rifuzas la kontrolon de la publikaj servoj fare de minoritatoj, ĉu tra la Ŝtato ĉu tra la merkato; Ni rifuzas tial ankaŭ la privatan entreprenan-elitistan reton kontrolata de la minoritatoj.

c/ Liberigi la aliron al la informado kaj al la kono

- Ni liberigas la aliron al la informado kaj al la libera kreado. Ni disvolvas nian bezonon de viva spertado kaj serĉado kiel konaj fontoj.
- Ni kunhavas la konon inter ĉiuj por konstrui pli grandan komunan bonon.

4) Nova ekonomio bazata sur la kooperado kaj la rilatoj de proksimeco

- Ni malakceptas la kapitalismon kiel produktan kaj merkatan mekanismon bazata sur la leĝo de la plejforto kaj la ĉiamiga kreskado.
- Ni malakceptas la nunan financon sistemon, superregita de la centraj bankoj kaj de la privataj bankoj kaj ni rifuzas la interezojn por la mono.
- Ni gvidas nin laŭ la jena principo: el ĉiu laŭ siaj eblecoj, al ĉiu laŭ siaj bezonoj.
- Ni fidus en la kooperado kiel bazo de la ekonomiaj rilatoj inter geegaluloj kaj gediversuloj.
- Ni intense promocias la kooperativismon en la laboro kaj en la konsumado. Ni favoras je la elradikigo de la salajra laboro kaj ĝenerale de la labora ekspluatado.
- Sociaj monoj, rekta interŝanĝo, dona ekonomio kaj komunuma ekonomio, kiel praktikaj agiloj por nova ekonomia sistemo.

- Ekonomio tiom lokala kiom eblas kaj sen perantoj. Egalaj rilatoj inter geproductistoj kaj gekonsumantoj
- Tie kie necesus, publika-komunuma financa sistemo kaj sen interezoj.

5) Kooperi kun la vivo kaj la naturo

- Ni aplikas la principojn de kooperado, konservado kaj respekto en nia rilato kun la naturo, de kio ni estas parto, kaj ni sekurigas la bonan kunvivadon kun ĉiuj aliaj vivantaj estaĵoj. Plie, la lokala popola decidpovo permesas kaj kuraĝigas tiujn principojn.
- Ni devas konscii pri la cikloj de la naturo por sekurigi la daŭripovan evoluon de la homa aktivaĵo, tio estas, ke ĝi devas daŭri tra la tempoj, **generacio post generacio**.
- Ni malakceptas la valorojn kaj la dinamikojn de la nuna sistemo kiuj nuligas kaj endanĝerigas multajn vivformojn, ankaŭ nian kaj samtempe elĉerpas la nerenovigeblajn rimedojn.
- Ni devas profiti de la **renovigeblaj** rimedoj laŭ malcentriga formo, kuraĝigante la memsufiĉon de la homaj komunumoj kaj reduktante la gravecon de la grandaj urboj, predantoj de rimedoj.

6) Kiel ni povas fari tion?

- Kohero inter iloj kaj celoj: la procezo de Integra Revolucio estas transiro inter la nuna sistemo kaj nova socio kaj homeco. La vojo por iri de unu loko al la alia estas lernaĵo kaj imago de kie ni iras. La iloj por realigi tiun transformiĝon devas tial kongrui kun la dezirataj celoj.
- Dialektika kaj samtempa konstruo inter strukturoj kaj valoroj: la ŝanĝo de valoroj necesas por ŝanĝi la strukturojn, sed por realigi profundan kaj ampleksan ŝanĝon de valoroj, necesas novaj strukturoj kiuj kuraĝigas kaj permesas praktiki ĝin.
- Kohere kun nia celo, ni devas realigi la integralan revolucion subaze de lokaj grupoj, fidante la malcentriĝon kaj la lokan agon, sed kun globalaj vidoj kaj pensado. Integra Revolucio, se ĝi paralele progresas en pluraj teritorioj kaj regionoj, estos multe pli solida kaj nehaltebla.
- La popoloj kaj la komunumoj kiuj vivas en ili, havas la nedepreneblan kaj legitiman rajton de organiziĝi kaj starigi la memdefendon de iliaj vivoj, de ilia sekureco, de ilia kulturo kaj de iliaj teritorioj, laŭ la maniero kiun ili taksas plejtaŭge, kaj respektante la principon de «minimumigi la perforton sur la homoj kaj maksimumigi la respekton por la libereco kaj la vivo de la personoj».
- Por povi realigi tiun revolucion, eltirante la maksimumon de rimedoj, laboro kaj legitimeco de la nuna sistemo por dediĉi nin al la nova konstruanta socio, ni pensas ke integra malobeemo estas tute legitima kaj necesa. Ni pensas ke ni devas uzi ĝin en ĉiu kunteksto cele al maksimumigo de nia transformo ago.